

# Pri la personaj pronomoj

## Metodikaj klarigoj

Claude Gacond  
Gaconda Metodo

Jen tabelo, kiu prezentas la fermitan sistemon de la esperantaj pronomoj personaj. Multaj esperanto-instruantoj bedaŭrinde ne kapablas priskribi tiun ĉi sistemon. Tial, post reprodukto de tiu ĉi tabelo, mi alportas metodikajn konsiderojn.

<b>Pronomoj personaj</b>	
<b>mi</b> ↑ egoo individua	<b>ni</b> ↑ egoo kolektiva
	<b>vi</b>
<b>ĝi</b> ↑ nehomeco	<b>li</b> ↑ homeco
	<b>li</b> ↑ vireco
	<b>ŝi</b> ↑ ineco
	<b>ili</b>
	<b>oni</b>
	∅

### 8 vortoj por 10 distingo

Tiu ĉi tabelo de la pronomoj personaj klare montras, ke en la koncerna fermita sistemo pronoma **esperanto realigas 10 distingojn helpe de nur 8 vortoj**.

Unu el la vortoj plenumas duoblan rolon kaj vort-manko ankaŭ ludas rolon.

Tiu sistemo baziĝas sur tre precizaj opozicioj, kiuj esprimiĝas per pronom-paroj.

Ni tuj diru, ke **la pronoma sistemo de esperanto estas sufiĉe malproksima al la hind-eŭropa pensmaniero**. Ĝi estas spirite pli parenca al distingoj propraj al lingvoj de tipo aglutino-izoliva, **kiuj ne konas gramatikajn genrojn**.

Jen tiurilate kelkaj bazaj klarigoj metodikaj, kiujn ĉiu instruanto devus asimili, antaŭ ol provi respondi al la demandoj de siaj lernantoj.

## Egoo individua kaj kolektiva

# mi ni

### Egoo individua = mi

La nocio de **egoo individua** esprimiĝas per la pronomo **mi**, kiu restas absolute senŝanĝa en siaj diversaj gramatikaj aperoj, kontraŭe al tio, kio okazas en la hind-eŭropaj lingvoj.

Komparo kun unu el la okcidentaj lingvoj estas tiurilate instruiga. Ni prenu kiel ekzemplon la tipe fleksian francan lingvon, utiligante vortelementojn el latinida deveno, por videbligi la leksikajn malsimilaĵojn:

**Mi** min lavas.

*Je me lave.*

**Mi** montras **mian** nazon, **mian** buŝon kaj **miajn** orelojn.

*Je montre mon nez, ma bouche et mes oreilles.*

Aŭskultu **min!**

*Ecoute-moi! (aŭ) Ecoutez-moi!*

Aĉetu libron por **mi!**

*Achète un livre pour moi! (aŭ) Achetez un livre pour moi! (aŭ)*

*Achète-moi un livre! (aŭ) Achetez-moi un livre!*

Kie esperanto uzas nur la vort-elementon **mi** senŝanĝe, kiel ĝi faras kun iu ajn vort-elemento, la franca bezonas aron da malsimilaj vortoj: **je, ma, me, mes, moi, mon**, kies etima parenceco al la esperanta **mi** estas la sono **m**, kiun oni retrovas en multaj aliaj hind-eŭropaj lingvoj.

### Egoo Kolektiva = ni

La nocio de **egoo kolektiva** esprimiĝas per la pronomo **ni**, kiu same restas absolute senŝanĝa en siaj diversaj gramatikaj aperoj. **Ni** signifas pli malpli: «**mi kun la aliaj mi de la grupo**».

Komparo kun la franca lingvo denove montras malsimilecon inter ambaŭ sistemoj, kvankam la franca ĉifoje bezonas malpli da vortoj.

**Ni** nin lavas.

*Nous nous lavons. (aŭ) Nous, on se lave.*

**Ni** montras **nian** nazon, **nian** buŝon kaj **niajn** orelojn.

*Nous montrons notre nez, notre bouche et nos oreilles. (aŭ)*

*Nous, on montre notre nez, notre bouche et nos oreilles.*

Aŭskultu **nin!**

*Ecoute-nous! (aŭ) Ecoutez-nous!*

Aĉetu libron por **ni!**

*Achète un livre pour nous! (aŭ) Achetez un livre pour nous! (aŭ)*

*Achète-nous un livre! (aŭ) Achetez-nous un livre!*

Kie esperanto uzas nur la vort-elementon **ni**, la franca bezonas la vortojn **nos, notre, nous, on, se**.

La pronomo *ni* estas speco de plurala *mi*. Tiurilate estas interese scii, ke, pri la distingo inter la **egoo individua aŭ singulara** (= *mi*) kaj la **egoo kolektiva aŭ plurala** (= *ni*), la ĉina lingvo estas pli ŝparema, ol esperanto. Al sia pronomo *ŭo* (= *mi*) de la **egoo individua** ĝi simple aldonas sian pluralan markon *men* (= *j*) por esprimi la **egoon kolektivan**, dirante *ŭo men* (= *mi plurala*).

La analizo de 18'200 kontrol-testoj ricevitaj de la 1'400 franclingvanoj, kiuj lernis esperanton per mia perkoresponda «*Kurso de esperanto por franclingvanoj*», montras, ke ĉirkaŭ 5% el ili skribis almenaŭ unu fojon *mij*, kiam ili volis diri *ni*. Tiuj franclingvaj komencantoj obeis al la vortfarada logiko propra al la lingvoj regulaj de la tipo aglutino-izoliva, kvankam ilia lingvo apartenas al tre malsimila lingvo-familio.

Esperanto fakte parencas al la lingvo-tipo aglutino-izoliva rilate al la vort-farado. Ĝi parencas ankaŭ al la lingvoj hind-eŭropaj, ĉefe latino-ĝermanaj, rilate al la deveno de siaj vort-elementoj. Bilde ni diru, ke ĝi estas la filo de gepatroj, kies reciprokaj devenoj estas hind-eŭropa kaj aglutino-izoliva. Tial la pronomoj *mi* kaj *ni* leksike iel rememorigas la vortojn *ma, me, mes, moi, mon* kaj *nous* de la franca, sed gramatike iel eĥas al la vortfarada sinteno propra al la aziaj lingvoj.

## Rilatoj inter egooj

### vi

La komunik-pronomo inter du **egooj** estas *vi*, sen konsidero, ĉu temas pri **egoo individua** (*mi*) aŭ **egoo kolektiva** (*ni*), kiuj sin esprimas.

**egoo individua** ⇔ **egoo individua**

**vi**

*mi* ⇔ *mi*

**egoo individua** ⇔ **egoo kolektiva**

**vi**

*mi* ⇔ *ni*

**egoo kolektiva** ⇔ **egoo individua**

**vi**

*ni* ⇔ *mi*

**egoo kolektiva** ⇔ **egoo kolektiva**

**vi**

*ni* ⇔ *ni*

Tial, kiel la angla lingvo, esperanto havas nur unu pronomon *vi*. Ĝi estas *vi-lingvo*, kiel la angla estas *you-lingvo*. Ĉiaj provoj vivigi la pronomon *ci* restis sensukcesaj pro sia fremdeco al la koncerna sistemo, kie la diverseco de situacioj ne esprimiĝas per multiĝo de vortoj, sed per aldono de determiniloj al la pronomo. Se la pronomo *vi* ne estas sufiĉe preciza, oni povas diri: *vi tie, vi ambaŭ, vi du, vi tri, vi kvar, vi ĉiuj, vi sola, vi solaj*, ktp. Oni agas iom same kun la pronomo *ni*: *ni tie, ni ambaŭ, ni tri, ni kvar, ni ĉiuj, ni solaj*, ktp.

# Komunikoj inter egoj pri iu aŭ io egoe ekstera

## Unua distingo

<b>li</b>	<b>ĝi</b>
↑	↑
homeco	nehomeco

Per **li** opozicie al **ĝi** esprimiĝas la nocio de homeco opozicie al la nocio de nehomeco. Sed anstataŭiĝas per la pronomo **li** nur koncernatoj reale konsciaj pri sia homeco.

Ekzemple pri sia homeco ne konscias **bebo**, tial en esperanto ĝia pronomo persona estas **ĝi**.

Aŭdante bebon, kiu daŭre ploras, malafabla najbaro klaĉas:

**Ĝi** ĉiam ploras, ĉar **ĝia** patrino ne bone zorgas pri **ĝi**.

## Dua distingo

<b>li</b>	<b>ŝi</b>
↑	↑
vireco	ineco

Sed familianoj emas homigi la bebon. Tial por ĝi en la familia vivo oni donas la preferon al la pronomoj **li** kaj **ŝi**, kiuj koncerne al la homeco distingas inter la vireco kaj la ineco.

Parolante pri sia ploranta bebo, la patrino diras al sia najbarino:

*Mia bebo ploras, ĉar **li** ricevas sian unuan denton.* (aŭ)

*Mia bebo ploras, ĉar **ŝi** ricevas sian unuan denton.*

Sed tio ne malhelpas la najbarojn plue diri:

*Ŝia bebo ploras, ĉar **ĝi** ricevas sian unuan denton.*

Tiun distingon inter la **vira sekso** kaj la **ina sekso** esperanto ne faras koncerne la bestojn. Tial oni diras de hundo, ke **ĝi** bojas kaj mordas, de bovino, ke **ĝi** produktas multe da lakto, de serpento, ke **ĝi** rampas, sen konsideri la sekson de la koncerna besto.

Nur se bestoj estas **homigitaj**, ekzemple en legendoj, fabeloj, fabloj aŭ kadre de la hejma vivo, oni uzas por ili la porhomajn distingojn virecan **li** kaj inecan **ŝi**.

Kiam ni vidas cikonion, kiu flugas, ni diras: *Ho, vidu tiun cikonion, kiel **ĝi** bele flugas. **Ĝiaj** flugiloj estas vere grandaj.*

Kiam ni vidas vulpon, kiu kuras for, ni diras: *Ho, vidu tiun vulpon, kiel **ĝi** bele kuras. **Ĝia** vosto estas eleganta.*

Sed, esperantigante la fablon *Le renard et la cigogne* (*La vulpo kaj la cikonio*) de *Jean de La Fontaine* (1621-1695), franclingvanoj tendencas uzi la pronomon **li** por la vulpo kaj **ŝi** por la cikonio, ne nur, ĉar ili konsideras ilin kvazaŭ personigojn de **viro** kaj **ino**, sed ĉefe pro vigla influo de la franca lingvo, en kiu la substantivo *renard* (= vulpo) estas gramatike **vir-genra** (*le renard*) kaj la substantivo *cigogne* (= cikonio) estas gramatike **in-genra** (*la cigogne*). La franclingvanoj pro tiu gramatika karakterizaĵo de sia lingvo nekonscie ludigas al la vulpo viran rolon kaj al la cikonio inan rolon.

Similajn ekzemplojn ni povus trovi en ĉiuj lingvoj, kies gramatikon karakterizas divido de la substantivoj inter **genraj kategorioj**. Tiurilate la germana estas pli nuancema, ol la franca, pro la divido de la substantivoj inter tri **genraj kategorioj**.

## Ekzemploj el nia literaturo

Estas grave konsideri, ke esperanto, kiel cetere la granda plimulto de la lingvoj en la mondo, ne dividas siajn substantivojn laŭ *gramatikaj kategorioj genraj*. Tial **Kálmán Kalocsay** (1891-1976) ĝenerale utiligas la pronomon **ĝi** por pronomigi ĉiujn bestojn, eĉ kiam ili karikaturas hom-tipojn. En lia poemaro *Ezopa saĝo* (Kopenhago, Eldonejo Koko, 1956) tion ekzempligas pluraj fabloj. Jen *La vulpo kaj la gruo* (paĝo 50a), kiu iel rememorigas la fablon *Le renard et la cigogne* de *La Fontaine*:

*Vulp' invitis al si gruon  
kaj al ĝi promesis ĝuon  
manĝi, trinki plej agrable.  
Tiu venis. Nu, surtable  
estis supoj delikataj,  
sed nur en teleroj plataj.  
Dum la vulpo do festenis,  
ĝia gasto vane penis  
per la longa, pinta beko  
pri elsuĉo aŭ elleko.*

*Tio la gruon tre incitis,  
ĝi la vulpon reinvitis;  
faris kuiradon grandan,  
ĉion bonan, pleje frandan  
donis, sed, kun venĝo-volo,  
en botel' de longa kolo.  
Sian bekon ĝi enŝovis,  
sed la vulpo vane provis  
manĝi el la svelta vazo,  
iris for kun longa nazo.*

Tiu fablo de **Kalocsay** ne plu pensigas pri *vira vulpo* kaj *ina gruo*, eĉe al la fablo de *La Fontaine*. Oni povas imagi ambaŭ kiel *inojn* al si reciproke malafablajn, se oni konsideras, ke hejme la *inoj* ĝenerale okupiĝas pri la kuir-arto, sed oni povas ankaŭ imagi ambaŭ kiel *virojn*, se oni ludigas al ili rolon de hotel-majstroj reciproke incitemaj.

Jen alia fablo, *La avida hundo* (paĝo 75a), kie **Kalocsay** aktorigas hundon. Tamen la pronomo **ĝi** estas plene sufiĉa, por karakterizi tiun agreseman idioton:

*La hund' kun granda pec' vianda  
riveron estis tranaĝanta,  
kaj en la akvo ĝi subite  
ekvidis sin respegulita.  
"Alia hund' kun viandpeco  
pli granda!" tiel ĝi imagis,*

*kaj tuj kun ega avideco  
la spegulbildon ĝi atakis.  
El ĝia bus' senkapte kapta,  
pum! falis la viando fakta,  
kaj dronis al rivera fundo.  
Malsati devis nia hundo.*

Kelkfoje **Kalocsay** tamen volas aparte reliefigi la homecon de siaj fablaj roluloj. Tiam, anstataŭ uzi la kutiman pronomon **ĝi**, li donas la preferon al la pronomo **li**. Tiam **ne viron** personigas la koncerna besto, sed **homon** senkonsidere al ties sekso. Jen la fablo: *La aglo kaj la alaŭdo* (paĝo 116):

*Alaŭdon kaptis aglo, kaj je l' indulĝpet'  
la rabobirdo diris al la kantistet':  
"Silentu, stulta, la pli forta estas mi,  
kaj kia ajn kantist' belvorta estas vi,  
vi venos, kien mi arbitre portos vin,  
laŭplaĉe mi delastos aŭ dismordos vin!"  
Kaj fierege, kun viktim' de sia rab',  
li flugis alten plu kun lanta flugilfrap'.*

Jen la komenco de la fablo *La oreloj de la leporo* (p. 73a):

*La leonon vundis besto korna.  
Li ordonis en kolero morna:  
"Ĉiu best' havanta korn-armilon  
iru el la regno en ekzilon!"  
Do elmigris cervo, kapreolo,  
kapro, ŝafo, ĉamo, kaj, ĉe kolo  
la orelojn longajn kuŝiginte,  
por ke tiuj ne elstaru pinte,  
iris en ekzilon - la leporo...*

En ambaŭ fabloj *la aglo* kaj *la leono* personigas perforteman *reganton*, kiu ne necese estas vira homo. Ankaŭ inaj homoj kapablas kondukti tiranece.

Pri la uzo de la pronomo *li*, aparte instruiga estas la poemego *La plej granda kulpulo* (paĝoj 108-113), kie nur por la muŝo estas uzata la pronomo *ĝi*, por reliefigi *ĝian* nuran bestan rolon.

#### **Jen pri la vulpo:**

*Tiel la vulpo. Tondre ekaplaŭdis  
flatistoj. Oni laŭdis  
la reĝon por l' noblega sentimento,  
kaj eĉ la vulpon pro la elokvento.  
Nu, la ruzulo tion aŭdis  
kun granda ĝojo kaj kontento:  
Pretertiriĝis tiel la atento  
pri lia propra kulpo kaj malico.  
Li haste kaŝis sin en lasta vico.*

#### **Kaj pri la urso:**

*Li dormis foje, sidis mi apude,  
kaj vidis, ke altrude  
sidiĝis al li sur la buŝo  
impertinenta muŝo...Ekŝvelis*

*mia kolero, kaj per peco roka  
mi murdis ĝin, sed ankaŭ kapo  
amika frakasiĝis per la frapo.*

„

*La povra urs' amare ploris, ploris,  
ĉiuj rigardis lin kompate,  
aliajn kulpojn ne esploris,  
li do tranaĝis glate.*

#### **Kaj la tigro:**

*Sekvis la tigro. Li de l' lipoj lekis  
la sangon (ĵus li manĝis) kaj ekblekis:  
"Kiu akuzos?" Brilis dentoj blankaj,  
l' okuloj verde fosforeskis.  
Kaj mutis ĉiuj, spiromankaj.  
Lia demando sen respondo restis.*

Tiuj ĉi ekzemploj, ĉerpitaj el originalaj poemoj, instigu instruantojn ĉiam troviĝi al la lernantoj la gramatikajn regulojn el atenta observado de beletraj tekstoj. Eĉ al tutkomencantoj oni ne timu laŭtlegi aŭ deĉifrigi poeman version, kiu taŭge respegulas gramatikan aŭ stilan karakterizaĵon de esperanto. Tial ĉiu instruanto havu submane studindajn ekzemplojn, el kiuj li ĉerpu modelajn frazojn en la taŭga momento.

En esperanto multaj fuŝuzoj pronomaj fontas el lernolibraj ekzemploj neniel kongruaj al la propra spirito de nia lingvo. Ĉiu instruanto konsciu, ke lernolibra lingvaĵo ofte respegulas nacilingvajn kutimojn. Verajn citindajn ekzemplojn oni ĉerpu el la originala verkaro de renomaj aŭtoroj. Ni malfide rilatu al tradukaĵoj, ĉar ili ofte transportas al esperanto nacilingvajn kutimojn tro facile bonvenajn.

En la franclingva esperantujo, ĝuste pro supraĵaj esperantigoj de fabloj de *La Fontaine* realigitaj de tradukistoj ne plene regantaj esperanton, oni utiligas laŭ tro franceca maniero la esperantan pronomaron.

## **Tria distingo**

### **ili**

Plurale ĉiuj tiuj distingo, propraj al la singularo, malaperas profite al la uzo de unu sola pronomo: *ili*. Sed kiel por *ni* kaj *vi* eblas distingi inter *ili tie*, *ili du*, *ili tri*, *ili ĉiuj*, *ili solaj*, ktp...

## **Kvara distingo**

### **oni**

La franclingvanoj kaj ankaŭ aliaj okcidentanoj tre atentu pri la pronomo *oni*, kiu estas absolute ĝenerala. Kontraŭe en la franca lingvo la pronomo *on* tre ofte anstataŭas la pronomon *nous*. Kiam franclingvano diras: *On est venus*, li fakte volas diri *Ni venis* (*Nous sommes venus*), tial la participo *venus* ricevas la markon *s* de la pluralo. Se temas nur pri virinoj, oni skribus: *On est venues*. La participo *venues* ricevas la markon *e* de la ineco kaj *s* de la pluralo. Plej multaj franclingvanoj ne konscias pri tiu fakto kaj tial fuŝuzas en esperanto la pronomon *oni*.

Grave fuŝa estas la influo de franclingvaj instruantoj ne konsciaj pri tiu danĝero, ĉar ekde la unuaj lecionoj ili disvastigas dialektan uzon de esperanto, en kiu malpreciziĝas la reciprokaj roloj de la pronomoj *ni* kaj *oni*.

Ekzemplo de konvena uzo de la pronomo *oni* : En Svislando *oni* parolas kvar oficialajn lingvojn, *oni* multe voĉdonas kaj *oni* ŝatas manĝi fonduon.

## Kvina distingo



La signo de absoluta nulo Ø simbolas mankon de pronomo en verbaj formoj kiel ĉe :

*Ne sunas, pluvas kaj malvarmas.*

*Estas jam la fino de la jaro.*

En tiuj frazoj multaj lingvoj utiligus pronomon: la angla dirus: *it* ..., la germana: *es* ..., la franca *il* (aŭ) *c'*... .

## Vort-ŝparo

Ĝenerale la lernolibroj nekcontentige raportas pri la pronoma semantiko de esperanto. Tial la afiŝo pri la pronomoj personaj unuavide ŝokas instruantojn, kiuj havas limigitan konon de la lingvo kaj al kiuj mankas metodikaj kaj ĝeneralaj lingvaj scioj.

Gramatika karakterizaĵo de esperanto estas, ke en ĝi ĉiu fermita lingva-sistemo ĝenerale konsistas el malpli da vortoj, ol da esprimitaj ideoj. En la fermita sistemo de la pronomoj personaj ekzistas nur 8 vortoj por esprimi 10 ideojn.

La manko de vorto, kiun simbolas Ø, konkretigas ideon. En lingvistiko la manko de vorto estas konsiderata kiel vorto. Per siaj kompar-lingvistikaj esploroj *Lejzer Zamenhof* (1859-1917) tion avangarde komprenis, dum plej multaj aŭtoroj de konkurencaj planlingvaj projektoj tion ne sciis. El tio fontas unu el la lingvaj superecoj de esperanto super ties konkurintoj.

Alia vort-ŝparo eblas, kiam vorto plenumas du rolojn, do kiam ĝi fakte konkretigas du malsimilajn ideojn. Tiam la kunteksto sciigas, kiun rolon ĝi ludas en la koncerna frazo. Tiel estas por la pronomo *li*, kiu personigas la homecon en opozicio al la nehomeco senkonsidere al la sekso de la koncerna homo kaj la viran sekson en opozicio al la ina sekso, se oni kvazaŭ senvestigas la homon.

En mia verko «*Didaktikaj konsiloj al esperanto-instruantoj*» miaj *Metodikaj konsiloj por la uzo de la instru-afiŝoj* alportas multajn ekzemplojn pri la unua rolo homeca de la pronomo *li*. *Li* anstataŭas la vorto *instruanto*, kiu estas uzata senkonsidere al ties sekso, ĉu vira, ĉu ina. Jen mi citas kelkajn frazojn el la paragrafo *Alparola situacio*:

*Instruanto konsideru, ke la ideala alparola situacio estas tiu ĉi: Li sidu apud la afiŝ-tenilo... Malantaŭ la afiŝaro li skribu la numeron de la videbla afiŝo kaj se necese aliajn helpindikojn. Tiel li ĉiam scios, kiun afiŝon reale vidas la instruatoj, sen devi mem rigardi ĝin. Tre gravas, ke li bone vidalvidu ĉiujn instruatojn, por ke tiuj ĉi ĉiam kapablu vidi lian vizaĝon...*

En tiu teksto la funkcio *instruanto* estas konsiderata laŭ homeca vidpunkto, sen distingo pri la seksoj de la instruantoj.

Sed kiel ni menciis, la pronomo *li*, ene de la homa kategorio havas ankaŭ la rolon konkretigi la *virecon* opozicie al la *ineco*, kiu tiam esprimiĝas per la pronomo *ŝi*.

Semantike esperanto estas ne nur ege senescepta lingvo, ĝi estas ankaŭ ege ŝparema. Sed pri tiu ŝparemo la lernolibroj bedaŭrinde nenion instruas. Tial al multaj la lingvo aperas pli malfacila kaj pli malregula, ol ĝi fakte estas. La ŝparemo de esperanto estas unu el la sekretoj de ĝia paroliga facileco.

Multaj lingvo-reformemuloj, kiuj preskribis la uzon de novaj pronomoj, ĝenerale nenion sciis pri la propraj karakterizaĵoj de esperanto. Ili preskribis propran uzon, antaŭ ol kapabli reale priskribi la lingvo-uzon de la kritikata lingvo. Disvastiĝanta modo nuntempe ŝatas la formulon *li/si*. Tiu uzo respegulas supraĵan konon de esperanto. Reveno al la ĵus citita teksto kun anstataŭo de *li* per la pronomo paro *li/si* tion montras. Tiu modo devigas eĉ aldoni *in* al la nomo *instruanto*:

*Instruant(in)o konsideru, ke la ideala alparola situacio estas tiu ĉi: Li/si sidu apud la afiŝtenilo... Malantaŭ la afiŝaro li/si skribu la numeron de la videbla afiŝo kaj se necese aliajn helpindikojn. Tiel li/si ĉiam scios, kiun afiŝon reale vidas la instruatoj, sen devi mem rigardi ĝin. Tre gravas, ke li/si bone vidalvidu ĉiujn instruatojn, por ke tiuj ĉi ĉiam kapablu vidi lian/sian vizaĝon...*

Instruanto, kiu diskonigas tian lingvo-uzon, malnuancigas esperanton. La lingvaĵo, kiun li instruas, perdis la pronoman opozicion *li* ⇔ *ĝi*. Ni troviĝas en dialektiĝa situacio.

## Pri la refleksiva pronomo

### SI

En la studata tabelo forestas la pronomo *si*, ĉar ĝi estas ali-dimensia ol la pronomoj personaj. Neniam ĝi aperas en la subjekta aŭ pilota funkcio, kontraŭe al la aliaj pronomoj.

## Pri la pronomo

### CI

Same forestas la pronomo *ci*, kiu estas mortnaskito dialekte uzata kun tre malsamaj roloj laŭ la koncernaj medioj. Internaciskale ĝia ofteco estas preskaŭ nula. Honesta metodiko priskribas lingvajn faktojn ĝeneralajn, kaj ne preskribas preferojn grupajn aŭ individuajn.

Nur en progresiga kurso oni interesiĝu pri tiu ĉi pronomo *ci* semantike fantoma. Kaj tiam oni ankaŭ povas mencii cerbumaĵojn de reformemuloj kiel la pronomojn *ri*, *ŝli*, *iŝi*, *iĝi*, *liŝi*, ktp... kiuj restos seneĥaj, ĉar ili fremdas al la propra spirito kaj semantikaj bezonoj de esperanto.

## Vokal-varioj

Nur la provoj intervenigi vokalan varion por la lingvo-uzo en brua etoso montriĝis sukcese efektivegebla: Tiam la uzo de la formoj *me* anstataŭ *mi*, *vu* anstataŭ *vi* kaj *no* anstataŭ *ni* faciligas la komprenon. Ofte tiu solvo estas la nura eblo uzi esperanton en gimnastika instruado, ĉar la *i*-vokalo propra al ĉiuj pronomoj estas konfuziga. Kiam esperanton oni komencos reale utiligi lerneje aŭ flughavene, tiam la koncernaj vokalvarioj estos bonvenaj. Tial gravas, ke al la vort-elementoj *me*, *vu* kaj *no* oni ne trudu proprajn signifojn.

Alia simila vokal-vario estas praktikata rilate al la cifero *ses*, kiu fariĝas *sis* por eviti ĉian konfuzon kun *sep*. Ankaŭ en sportaj konkursoj, en lotumado kaj telefone oni ofte uzas tiun precizigan solvon, kiu malaperigas ĉian miskomprenon. Same agas la germanlingvanoj, kiam ili diras *zwo* anstataŭ *zwei* (= du) por eviti konfuzon inter *zwei* kaj *drei* (= tri).

Tiuj vokal-varioj neniel perturbas la lingvo-semantikon. Instruantoj nepre konu tiujn faktojn, ĉar ĝuste ili estas konfrontataj al la praktikado de esperanto en tumultaj medioj. Okaze de gimnastika konkurso aŭ de kolektiva ludo ekscitiga, tiuj vokal-fleksioj estas pedagogie bonvenaj.

Claude Gacond.

Gaconda Metodo, La Chaux-de-Fonds, 2005.